



Registrolibro de la Civitanoj de la Mondo

Kunsido de la Administra Konsilantaro la 10an de aprilo 2011 en UNGERSHEIM (Francio, 68190)

Protokolo

Malfermo je 10 h 30

Ĉeestas

- Daniel Durand, prezidanto,
- Liliane Metz-Krencker, Claudine Fischer, Roger Winterhalter, Laurent Son, Kim Compagnon, Alain Bal, membroj.
- Kaj multaj civitanoj de la mondo kunvenintaj okaze de la tutmondismaj tagoj en Ungersheim.

Kunsida prezidanto : Roger Winterhalter

La protokolo de la antaŭa [kunsido](#) (En Lomeo, Togolando) estas aprobata interalie koncerne :

- la reenoficigon de la ekziĝinta Estraro en 2010
- la federacigan transformon de Registrolibro (ellaborata projekto)
- la necescon por la responsantoj de Registrocentro esti enregistritaj kaj posedantoj de la Mondcivitana legitimkartoj

Financoj

Daniel Durand prezentas la financon bilancon de la jaro 2010. El tiu bilanco aperas :

- kresko de la memvolaj individuaj kontribuajtoj
- malkresko de la kontribuajtoj de la Registrocentroj
- regateco de la elspezoj rilataj al la balotelektoj al la Kongreso de la Popoloj.
- pozitiva bilanco de 1.488,88 Eŭroj.

Post mallonga diskuto, la bilanco estas unuvoĉe aprobata de la ĉeestantoj minus unu sindeteno.

Korespondantoj kaj Registrocentroj

Svisio : La Registrocentro en Ogens-Bercher ne plu funkcias. Claudine Fischer konsentas plu plenumi la laboron kiel simpla " korespondantino " .

Novaj Registrolibraĵaj Korespondantoj : François Hounsounou en Lokossa (**Benino**) Mahamat Hassan en Ndjamena (**Ĉadjo**), Ibrahim Labat en Bangui (**Centrafrika Respubliko**).

Kameruna Registrocentro: Post intensaj labormonatoj en Nkongsamba kaj Douala kaj post multaj interŝanĝoj de retpoŝtoj, la Kameruna Registrocentro estas finfine konsistigita kaj aprobata. Prezidanto : Alain Noël Njiokem Kwatchou, sekretario : Ibrahim Labat, Kasisto : Ancelot Ngameleu. La Registrocentra sidejo estas en Nkongsamba, du oficejoj estas malfermitaj en Douala.

Internacia Registrocentro : Laurent Son plenumis la portempan deĵoradon dum la foresto de Stevens Chellum. De nun, kun Louis Gohin, ili konsistigas veran teamon kapablan evolui al aŭtonoma statuso sine de la (projektata) federacio. Kunveno estas planita sabate la 30an de aprilo en la lokalo, 66 boulevard Vincent Auriol.

Fermo de la kunsido je 11 h 30